

& La blondulino:

< Rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 272 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Dionisios Solomos. El greka tradukis Antoni Grabowski (Parnaso de Popoloj, 1913). Baladigis Martin Strid (2016) permelodio kaj rekantaĵo de Vilmunda balado.)

(#Melodio:

<1,6:34> (/falmi sofa fami miire;re rere dore mi; mi fami fami faaso;so sofa fami reldo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e) ×8)+

(&Strofoj:

'1 /Mi2 vidis ŝin hieraŭ ; Malfrue:
Blondulin' ; Eniris barkon, kiu ; El
hejm' forportis ŝi2n.

(×: **Dancu mastrino ; belan elektas
mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel
povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

'2 Plenblovis blankajn velojn ; De l'
freŝa vento flu' ; Kiel kolomb' etendas ;
Blank-flugiletojn du.

'3 Salutis ŝi amikojn, ; Salutis kun
malĝoj' ; Adiaŭ-redirante ; Per tuk' je
lasta foj'.

'4 Kaj post la salutado ; Mi restis tie ĉi,
; Ĝis malproksimo ĉion ; Forkaŝis jam
al mi.

'5 Mi post mallonga tempo ; Ne sciis
diri jam, ; Ĉu brilas blanka velo ; Aŭ
mara ŝaŭmo-skvam'.

'6 Post kiam velon, tukon, ; Forkaŝis
akvo-stri', ; Ekploris la amikoj, ;
Ekploris ankaŭ mi.

'7 Ne barko min plorigis, ; Nek vel'
plorigis min, ; Mi ploris pro iranta ;
Fremdejon blondulin'.

'8 Ne ploras mi pro barko, ; Kun blanka
vel' sur mar', ; Mi ploras blondulinon ;
Kun ŝia blonda har'.)